

PRAJNJA-PARAMITA-SUTROJ

aŭ

Sutroj pri la elfaro de l' ekkono

Tradukita de Seiho NISHI

*Vajracēdika-prajñja-paramita-sutro*

## **Diamanto-sutro pri la elfaro de l' ekkono**

(Resumita traduko)

1. Iam Budao restadis kune kun multaj disĉiploj en Jetavano apud Sravasto<sup>20</sup>). Iun tagon, kiam li revenis de sia matena almozpeto en la urbo.
2. Lin demandis Subuto<sup>21</sup>), kiamaniere oni sintenadu, kiam oni celas bodisatvon<sup>a)</sup>, kaj tiamaniere komencis la katekismo inter Budao kaj Subuto.
3. Ĉiujn vivaĵojn mi devas senescepte enkonduki en la eternan pacon, sed neniuj estas ĝis nun savita. Kiom longe la bodisatvo ne liberigas sin de la penso pri la vivaĵo<sup>22</sup>), li ne rajtas esti nomata bodisatvo.
4. Ĉe la almozdono la bodisatvo ne devas alteniĝi al sia bonfaro; tiamaniere lia bonfaro estos nemezureble granda.
5. Ke la tatagato<sup>b)</sup> posedas 32 fizikajn karakterizaĵojn, estas ne vera, nek ne vera. Oni devas observi lin de ambaŭ flankoj.
6. Post 500 jaroj<sup>23</sup>), kiam la ĝusta doktrino staras en danĝero, troviĝos tamen ankoraŭ sennombraj eminentuloj, kiuj kredas tiun ĉi sutron. Ili ne alteniĝos al la penso pri la memo, pri la vivaĵo, pri la individuo kaj pri la persono<sup>22</sup>), plue pri la estaĵo entute, eĉ pri la penso mem. Ili ne devas pensi eĉ pri la darmo<sup>24</sup>), des pli pri io nedarma. Kiu konas la metaforon de la pramo<sup>25</sup>), devas forĵeti eĉ la darmon mem.
7. Ne ekzistas la darmo, kiun la tatagato predikis, ĉar ĝi ne estas ekkonebla nek klarigebla. Ĝi ne estas la darmo, nek ne estas la darmo, ĉar la sanktuloj estas la absoluta ekzistado.
8. Eĉ se oni oferus al la tatagato la tutan trezoron de la universo, lia bonfaro ne superus tiun, kiun li faros per la propagando de iu ajn versokvaro el tiu ĉi sutro, ĉar ĉiuj vekiĝintoj elfaris la ekkonon laŭ tiu ĉi principo. Sed la tatagato diras, ke la principo de la vekiĝinto ne estas principo de la vekiĝinto, guste tial ĝi estas nomata la principo de la vekiĝinto.
9. (a) Kiu pensas sin srota-apano<sup>26</sup>), ne estas srota-apano. La srota-apano ne pensas sin srota-apano, ĝuste tial li estas nomata srota-apano. La samon oni povas diri (b) pri sakridagamino<sup>27</sup>), (c) pri anagamino<sup>28</sup>) kaj (d) pri arhato<sup>29</sup>). (e) Monologo de Subuto: Iam Budao nomis min arhato. Se mi tamen pensis min arhato, li certe ne nomis min arhato.
10. (a) Budao akiris nenion ĉe Dipankaro<sup>30</sup>). (b) Se iu bodisatvo pensas, ke li iam sukcesos fondi bucu-landon<sup>31</sup>), li ne sukcesos, ĉar la fondado de bucu-lando ne estas fondado, kaj ĝuste tial ĝi estas nomata fondado. (c) Oni ne alteniĝu al ĉio fenomenaj! La fizika korpo ne ekzistas, nek ne ekzistas, kaj ĝuste tial ĝi estas nomata korpo.

11. Enhavo preskaŭ sama kiel §8.

12. Distrikto, kie tiu ĉi sutro estas predikata, fariĝos same sankta kiel stupo<sup>32</sup>.

13. (a) La elfaro de l' ekkono predikata de la tatagato ne estas elfaro de l' ekkono. Ĝuste tial ĝi estas nomata elfaro de l' ekkono. (b) La darmo predikata de la tatagato ne ekzistas. (c) La polvo (atomo), pri kiu la tatagato predikas, ne ekzistas, ĉar li mem asertas tion; kaj ĝuste tial ĝi estas nomata polvo. Oni povas ankaŭ same diri pri la mondo. (d) La tatagato ne montras 32 fizikajn karakterizaĵojn, ĉar li mem asertas tion; ĝuste tial ili estas liaj karakterizaĵoj. (e) Eĉ se oni oferus sian tutan korpon dum nemezureble longa tempo, la merito ne superus tion, kiun oni akirus per la prediko de iu ajn versokvaro el tiu ĉi sutro.

14. (a) Aŭskultinte tion Subuto ekploris pro emocio. Ke oni pensas la sutron vera, signifas, ke oni ne pensas ĝin vera. Ĝuste tial la tatagato predikas pri la vereco de la sutro. (b) Kiu predikas tiun ĉi sutron eĉ post 500 jaroj<sup>22</sup>, estas sendube granda eminentulo. (c) Li tiam nenion pensos, nek ne pensos, ĉar "pensi ion" signifas "pensi nenion", kaj ĉar la tatagato estas ankaŭ for de ĉia penso. (d) La plej supera elfaro de l' ekkono, pri kiu la tatagato predikas, ne estas la plej supera; ĝuste tial li estas nomata la plej supera elfarinto. (e) Same ankaŭ la elfaro de la tolerado<sup>33</sup> ne estas elfaro. Budao: Iu malica reĝo<sup>34</sup> iam eltranĉis al mi pecon da karno el mia korpo; mi pensis tiam nenion, mi eĉ ne pensis, ke mi pensas nenion. Same ankaŭ mi nenion pensis, kiam mi iam estis ermito nomata Ksantivadino<sup>35</sup>. (f) La tatagato devas disdoni almozojn al ĉia vivaĵo<sup>22</sup>. La vivaĵo ne estas tamen vivaĵo, ĉar la tatagato mem asertas tion. (g) La darmo ne entenas veron, nek malveron. La bodisatvo egale disdonu almozojn, ĉu en mallumo, ĉu en lumo. (h) Kiu kredas ĉi tiun sutron kaj propagandas ĝin, akiros nemezureble grandan meriton.

15. (a) Enhavo preskaŭ sama kiel §8. (b) Kiom longe oni alteniĝas al si mem, al la vivaĵo, al la individuo kaj la persono (§3), oni ne povos kredi tiun ĉi sutron. (c) Enhavo preskaŭ sama kiel §12.

16. (a) Kiam oni estas ofendita, kvankam oni estas fidela al tiu ĉi sutro, tio okazas, ĉar oni devas per tio rekompensi la pekojn, kiujn li faris en sia antaŭnaska vivo. (b) Budao: Iam mi sindone servis Dipankaron<sup>30</sup> kaj multajn aliajn tatagatojn. Mia merito ne superos tiun, kiun oni akiros post 500 jaroj<sup>23</sup> per la propagando de tiu ĉi sutro. (c) Oni eble eĉ konfuziĝos, kiam oni komprenis la mirindan meriton de tiu ĉi sutro.

17. (a) Budao: Kiu volas esti bodisatvo, devas klopodi por enkonduki ĉiun vivaĵon en la eternan pacon. Li tamen neniam sukcesos, ĉar kiu pensas pri la vivaĵo ne rajtas esti nomata bodisatvo (§3). (b) Mi akiris nenion ĉe Dipankaro<sup>30</sup> pri la darmo. Se mi fakte akiris ĉe li ion, li certe ne profetis, ke mi iam fariĝos Ŝakjamunio. (c) La tatagato estas kromnomo de la leĝo de la kosmo, la eco de l' ekzistado, en kiu nenio nove estiĝas. (d) Budao: se oni nomas min vekiginto, oni kalumnias min, ĉar la darmo, kiun mi predikas, entenas nenion veran aŭ malveran, kaj ĝuste tial ĝi estas nomata darmo. (e) Kiu estas nomata virtulo, ne estas virtulo, ĝuste tial li estas nomata virtulo. (f) Se iu bodisatvo diras, ke li kondukos ĉian vivaĵon en la eternan pacon, li jam ne estas bodisatvo, ĉar iu nomata bodisatvo ne ekzistas. Ne ekzistas ankaŭ io nomata memo, io nomata vivaĵo, io nomata individuo kaj io nomata persono (§6). (g) Enhavo preskaŭ sama kiel §10-b. (h) La tatagato laŭde nomas bodisatvon vera eminentulo, se li decide neas la ekziston de la memo<sup>22</sup>.

18. (a) Budao: Ĉu la tatagato posedas fizikajn okulojn? Subuto: Jes! Ĉu ĉielajn okulojn? Jes! Ĉu okulojn de l' ekkono? Jes! Ĉu okulojn de la darmo? Jes! Ĉu okulojn de la vekiĝinto? Jes. (b) Sennombraj estas la vivaĵoj, kiuj troviĝas en la sennombraj mondoj. Al ili ĉiuj mi konas la daŭran fluon de la psiko<sup>36</sup>). La fluo de la psiko ne estas tamen fluo, ĝuste tial ĝi estas nomata fluo. Ĝi estas por ĉiam nekaptebla.
19. "Amasigi bonfarojn" signifas "ne amasigi bonfarojn". Cetere la tatagato certe ne predikas pri tio.
20. (a) Ke la tatagato posedas perfektan korpon, neas li mem. Ĝuste tial li posedas ĝin. (b) Ke la tatagato posedas fizikajn karakterizaĵojn, neas li mem. Ĝuste tial li posedas ilin.
21. (a) Budao: Se iu diras, ke mi instruas la darmon, li kalumnias min, ĉar ekzistas nenio, kiu estas nomata darmo. (b) Ĉu ankoraŭ vivas tiaj, kiuj eĉ post 500 jaroj<sup>23</sup>) kredas la darmon? Budao: ili ne vivas, nek ne vivas, ĉar "iu vivas" signifas "neniu vivas".
22. La tatagato neniam akiris eĉ unu peceton de la plej supera konvinkiĝo; ĝuste tial ekzistas la plej supera konvinkiĝo.
23. Al la konvinkiĝo troviĝas nenia rango; ĝuste tial troviĝas la plej supera konvinkiĝo. Ĝi egale malaprobas la ekziston de la memo, de la vivaĵo, de la individuo, kaj de la persono (§3). Ĝi estas atingebla nur per la darmo, kiu tamen ne estas la darmo, kaj ĝuste tial ĝi estas nomata darmo.
24. Enhavo preskaŭ sama kiel §8.
25. La tatagato ĝis nun neniam savis vivaĵojn, ĉar li malaprobas la memon, la vivaĵon, la individuon kaj la personon (§3), al kiuj la ordinaruloj<sup>37</sup>) alteniĝas. La ordinaruloj ne estas tamen ordinaruloj, kaj ĝuste tial ili estas nomataj ordinaruloj.
26. La tatagatoj ne posedas la fizikajn karakterizaĵojn, cetere Ĉakravarti-raĵo<sup>38</sup>) estus ankaŭ tatagato. (b) Kaj Budao recitis jenan versokvaron: Kiu volas ekkoni min per formo, /kaj serĉi min per voĉo, /klopodas vane, /ĉar oni tiamaniere neniam ektrovas min.
27. La tatagato ne atingis la ĝustan vojon per la eco al li karakteriza. Al tiu, kiu celas bodisatvon, nenio baras la vojon.
28. Se bodisatvo ĝisfunde kredas, ke la darmo ne havas la memon kaj estigas nenion, lia bonfaro estos nemezureble granda. Li devas propriigi la meriton, kiun li akiris per sia bonfaro, por ke li ne alteniĝu al ĝi.
29. Budao: La tatagato neniam foriras, nek revenas<sup>39</sup>), kaj ĝuste tial li estas estiminda vekiĝinto.
30. (a) Oni pulvorigu la senliman kosmon en sennombrajn arojn de elementoj. Tiaj aroj ne estas tamen realaĵoj, cetere la tatagato ne nomis ilin aroj. (b) La senlima kosmo ne estas kosmo; ĝuste tial ĝi estas nomata kosmo. Se oni aprobas la kosmon, oni ankaŭ devas aprobi la unuigitan tutaĵon. Ĝi estas neesprimebla per vortoj; ĝi ne ekzistas, nek ne ekzistas, kaj nur la ordinaruloj alteniĝas al ĝi.
31. (a) La opinio de la tatagato pri la memo, la vivaĵo, la individuo kaj la persono (§3) ne estas opinio, ĉar li asertas tion, kaj ĝuste tial ĝi estas nomata opinio. (b) Kiu marŝas la vojon de bodisatvo, devas observi kaj kompreni ĉion sen alteniĝo. La alteniĝo ne estas tamen alteniĝo, ĝuste tial ĝi estas nomata alteniĝo.

32. (a) Se piaj gejunuloj kredas kaj propagandas iun ajn versokvaron el tiu ĉi sutro, ili akiros nemezureble grandan meriton. Se oni tamen volas klarigi la sutron, oni prefere ne klarigu ĝin, kaj tio estas ĝuste la klarigo. (b) Kaj Budao finis la katekismon per jenaj versoj: La fenomenaj mondo estas kvazaŭ steloj, ombroj, lumetoj, kvazaŭ vizioj, rosoj, ŝaŭmero, kvazaŭ songoj, fulmoj, nuboj. Tiel oni komprenu!<sup>40)</sup>

Fino de la sankta sutro pri la elfaro de l' ekkono, kiu frakasas ĉion kiel diamanto.<sup>41)</sup>

a) Bodisatvo, bosacu\*, kandidato de tatagato.

b) Tatagato, nĵorai\*, vereco enkorpiĝinta; en la sutro uzata kiel kroma nomo de Budao.

20) Gida-rin\* aŭ Gion\* apud Ŝaë-jô, ĉefurbo de Kosalo.

21) Subodai\*, unu el la 10 grandaj disĉiploj de Budao, astrologo.

22) La bodisatvo devas liberigi sin krome de la pensoj pri la memo (atmano), individuo, kaj persono (?). La budaismo opinias ilin kiel sunjato (5) "fenomenigita", kaj neas la bramanisman ideon, laŭ kiu la atmano (我=個人我) faras la unuecigan centron de ĉiu aĵo, kaj koincidas kun la bramano (梵=宇宙我), la plej alta principo de la bramanismo, kosma animo, en kiu baniĝas la tuta fenomenaj mondo.

23) Dum la unuaj 5 centjaroj post la forpaso de Budao la budaismo daŭrigos prosperon; en la duaj 5 centjaroj ĝi staros en danĝero, tiel pensis Budao mem.

24) 法 ho\*. La fundamenta doktrino de la budaismo: ĝi signifas ordon, leĝon aŭ normon de la naturo, preskaŭ samsignifa kiel logoso en la greka filozofio (Shimazaki).

25) t. e. pramo por atingi la transan bordon de l' ekkono.

26) Sudaon\*, kiu vivas en la fluo de la eterna paco.

27) Ŝidagon\*, kiu bezonas renaskiĝi ankoraŭ unu fojon en tiu ĉi mondo.

28) Anagon\*, kiu jam ne bezonas renaskiĝi en tiu ĉi mondo, (oni rimarku la ideon pri la metempsikozo).

29) Arakan\* aŭ rakan\*, la plej alta el la 4 nomitaj klasoj de ŝravakoj, ŝomon\*, studentoj de la budaismo.

30) Nentô-nĵorai\*.

31) Regno, en kiu tatagato regas.

32) Sanktejo, kie oni konservas la cindron de sanktulo.

33) "Toleri la persekuton" estas unu el la 6 virtoj (roku-haramicu\*). kiujn la bodisatvo devas praktiki: disdonado, sinesplorado, tolerado, penado, stabiligo de la psiko kaj klerigo de la saĝeco.

34) nomata Kalinga-raĵo, Kari-ô\*.

35) Ninniku-sennin\*, ermito, kiu praktikas la toleradon.

36) ĉar la psikaj procezoj okazas seninterrompe laŭ la kaŭzeca principo.

37) 凡夫 bonpu\*, kiuj ankoraŭ ne konvertiĝas al budaismo.

38) Rinten-ô\* ideala reĝo, kiu ankaŭ montras la tatagatajn karakterizaĵojn. Oni por ĉiam atendas, ke li iam ekaperos en la mondo kaj subigos la tutan Hindion, tamen ne per armiloj sed per justeco.

39) ĉar li troviĝas ĉie kaj ĉiam.

40) Laŭ la ĉina teksto: Ĉiuj fenomenoj estas kvazaŭ songoj, vizioj, ŝaŭmero aŭ ombroj, kvazaŭ rosoj aŭ fulmoj. Tiel oni komprenu! Rosoj aŭ fulmoj, 如露如電 nĵoro-nĵoden\*, ŝate

uzata frazo por esprimi la efemerecon de la homa vivo.

41) Post finskribo de tiu ĉi traduko mi havis ŝancon legi esperantan tradukon de la Korosutro fare de s-ro Ikeda Hirosi (dato de publikigo?), kaj mi varme rekomendas al miaj legantoj legi ankaŭ tiun ĉi bonegan verketon.